GISTO, okt,2008

Redaktas: ottovaske@ibest.com.br
Str. Esperanto, 880 - 95760-000 Kaiurbo-RS
Donace por ĉeestantoj dum la Verda Kafo
Neglektemuloj ŝuldas R$ 01,00 al nia kaso.
Ĉi postulo celas venigi kaj feliĉigi la ĉeestantoj.

10 10 10 10 10 10 10 10 10 10 10 10 10 10 10 10 10 10 10 10 10 10 10 10 10 10 10 10 10

RADIO

En la nuna printempo la signaloj de ĈRI atingas Sudamerikon, laŭ radioamatora skalo, de nulo ĝis 9, kun forteco varia de 6 ĝis 9, kelkfoje plus. Iu ajn eteta ricevilo komforte aŭdigas la elsendojn el Pekino. Sciatas, pere de nia aktiva Arno, ke la signaloj de Pola Radio kaj tiuj de Radio Vatikana atingas nian regionon ankaŭ per belaj signaloj kaj modela prononco, vere indaj je ciutaga aŭskultado, mi konstatas tra la ilo Markvision, pruntita al mi. Nu, karaj gelegantoj, se vi pensas lertiĝi en konversaciado sen manko de la ĝustaj vortoj necesaj por difini enmensan ideon, nepre vi devas kutimiĝi al rutina R-aŭkultado ĉiutaga! Memoru ke facile kompreni fluan paroladon dependas de kutimiĝo al dirmanieroj kaj nuancoj en la voĉa modulado. Estas interesse atente aŭskulti la geparolistojn kaj noti al si la malfacilojn kiujn ili trovas dum la prononcado de vortoj fremdaj al ĉinoj. Jen bona motivo por vi, kiu neniam leteris al ĈRI, por komenti erojn kiuj indas komentojn. Jen adreso kiu faciligas ensendi tekstojn sen multekosta poŝttarifo: Ĉina Radio Internacia – R. José Linhares, 137/401 – 22430-220 Rio de Ĵaneiro-RJ - La estraron de MOMENTO mi komisias publikigi la nomojn de brazilaj alskribintoj, kiuj zorgas pri la longviveco de viaj elsendoj.Vi ŝuldas tion. Memoru ke Svisa kaj Pola radioj mortis manke de letera subteno far pigraj aŭskultantoj.Homoj kiuj ne subtenas komunan objektivon en aviado, estas nomataj parazitoj, t.e. nur esperas ke aliuloj surŝultrigu la pianon dum ili senzorge amindumas.

PLENDO

Pasintan semajnon mi planis almenaŭ unu fojon ĉeesti la pliperfektigan kurson far Marcelo k Cezar, en GEA, la 3-an sabaton. MI invitis tiucele nian aktivulon Arno kaj li tuj konsentis. En tiu tago li alveturis Kaiurbon nur ke, okazis al li akcidento, sen vundi lin, nur iom la aŭton. Li decidis ne daŭrigi la vojaĝon, ni tagmanĝis kune, adiaŭis kaj mi enbusiĝis prue al POA. Mi stariĝis sur Str. Andradas,1251 kaj atendis ke gesamideanoj alvenu, por eniri kune. Pasis kvaronhoro neniu venis. Mi telf-vokis sed el GEA neniu respondis.Do mi kontaktis al Cezar. Li klarigis ke la kurso okazas nur en la unua sabato. Domaĝo.Oni primekas la fakton, ke okazas tro pokaj e-renkontiĝoj. Se la estraranoj nenion iniciatas, eĉ ne komunajn tagmanĝojn, ne restas alternativo pratiki la lingvon, Cefe ne por homoj al kiuj mankas komputilo/Internet.

JARKOTIZOJ

Estas necese ke la GEA-kasisto ofte trinku Verdan Kafon, por havi facilan ŝancon montri la staton de la kaso kaj samtempe enkasigi kotizojn. “Arbaruloj”, kiam vizitas POA, multe devas naveti por trovi necesaĵojn mankantaj internlande. Tial restas poka tempo por sociala vizito

al la Asocio kaj, cetere, kiam oni trovas neniun, denove forpasas longa tempo ĝis oni denove havos apetiton kotizon pagi.

LINGVOLERNADO

ĈRI nuntempe instruas frazaron en la ĉina lingvo. Atentege mi aŭskultas sed miaj duraj timpanoj rifuzas akurate kompreni la nuancojn de la prononcado. El tio rezultis rememoro pri humora TV-programo, pri ridiga sceno, vere tre lerte muntita: Al morto kondamnita ulo,per fusilpafo, staris okulvindita antaŭ la stonmuro. Pafista skvadrono pretiĝis por plenumi la ezekucion sed subite okazis kverelo inter la pafistoj, pri la ĝusta horo. Okazis ordonoj ka malordonoj dum kiuj la kondamnita viro devis atendi ĝis ili interkonsentos. Fine aŭdiĝis la komando: celumu pafilon! Sed pafo ankoraŭ ne okazis. La ulo mem despere komandis, **pafu!** - Se mi devus elekti inter lerni la ĉinan aŭ morti, en sama situacio, eble ankaŭ mi mem ordonus: pafu tuj!

AFLIKTO

Bildigu al vi mian aflikton kiam lastan dimanĉon al ĉi Gisto mankis dek linioj por ke ĝi estu preta kaj mi tuŝis eraran klavon. Zorgoplene mi provis elsaviĝi, parte sukcesis tamen tuj poste restis nur la blanka ekrano kie nelge preskaŭ prespreta staris la Gisto-1008. Ĝi estis ne plu retrovebla kaj ĉi eterna rekruto devis emisii SOS al siaj filoj. Domaĝo. Ankaŭ ili ne povis helpi min. La nura solvo: reredakti la tuton. Ne ridu je miaj kostoj...! Ankaŭ via luksa ludilo ie havas tiun danĝeran klavon kiu, senvole tuŝita, ŝvitigas vin se estas neprokrastebla kompromiso kaj la tempo kurtas.

OLDECO

Iĝis kutimo mia, al ĉiuj duonserioze ordoni, NE OLDIĜU. Ĝi havas la ĉefan celon, mi mem. Tiu dirajo provas mildigi iun fuŝan agon mian aŭ de amiko. Do ne sentu sin ĝenata, daŭru ĉiam bonanima kaj optimisma.

NATURISMO.

Al mi ŝajnas nesincera la hereza konduto de kultaj homoj rilate al nudismo. Mi neniam vizitis nudisman strandon sed laŭ la hodiaŭa vivado ni ĉiuj sportis kaj laboris, kun neceso tuj sin bani en komunaj duŝejoj kie la urĝo ne lasas tempon por unuopa duŝo. Nude ĉiuj kvazaŭ vetbaniĝas. En nia lando inoj disde viroj sed en nordaj eurolandoj ne plu. Ĉu tial, ke ili estas pli bonedukitaj? Tiurilate mi proponas al vi eltirajon de INOE-gazeto, far Valentin Melnikov:

NATURISTA MARŜO

Varmas tagoj en somero,
Bonas resti ĉe la bord'.
Homoj apud la rivero
Agas laŭ kutima ord':
Ventoblovo iĝas plago
Por malseka naĝkostum':
Pro la deco dignas pago –
Frostotrem'kajmalvarmum
Laŭ natur' – nenio kroma,
La ripozon ĝuas ni.
Akvo, sun' kaj korpo homa
En tuteca harmoni'
Iu skoldas nin "morale",
Sed respondas ni sen tim':
Se kondutas vi normale –
Puras korpo kaj anim'.

.....Ĉu vi legis ĉi suban?(DG):

RUZA ARTIFIKO

Knabino 7-jara, al panjo: panjo, mi promenos ĉirkaŭ la kvartalo kun nia hundineto, ĉu jes? La patrino: ne,ne,ne!, ĝi seksardas. Demandu paĉjon.... en la garaĝo. Trovinte lin, ŝi petas lian permeson. Ankaŭ li neas sed subite decidon ŝanĝas. Momenton! Li privisas la hundinon per benzino kaj diras al ŝi: Nun vi povas iri sed ne liberiigu ĝin de la gvidilo! Duonhoron poste ŝi revenas sen la ŝatbesto. Li pridemandas ŝin: kio okazis, kie ĝi? Naive la knabino klarigas:finiĝis la benzino. Helpema hundo puŝos ŝin ĝis nia hejmo....